
# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ syyskuu ◆ septembro ◆ 4/2015


## La jubilea 100-a Universala Kongreso, p. 4


◆ La Aŭtunaj Tagoj de EAF en Lahti, p. 8

◆ Somera kurso 2016, p. 14 ◆ La 48-a konferenco de ILEI, p. 16

◆ Esperanto bonvena sur la insulo Saaremaa, p. 20

// # ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 *eafgazeto@esperanto.fi*
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori 💻 *robog@gmx.de*
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* 💻 *maj-lis@maisanpaja.info*
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 💻 *eaf@esperanto.fi*
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300
**Kansi/Pärm/Kovrile:** Naturamiko, Foto: Robert Bogenschneider

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 💻 *eafprezidanto@esperanto.fi*
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 *paivi.saarinen@iki.fi*
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 💻 *eafsekretario@esperanto.fi*

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 💻 *robog@gmx.de*
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *tiina.kosunen945@gmail.com*
*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. 💻 *arja.kuhanen@netti.fi*
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 *paula.niinikorpi@gmail.com*

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 💻 *tapani.aarne@mbnet.fi*
*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 💻 *esperarto@phnet.fi*
*Tuomas Latva-Pirilä*, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 💻 *tuomas.latva-pirila@suomi24.fi*

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *eafkasisto@esperanto.fi*
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo 💻 *eaf@esperanto.fi*

**Internet**: *www.esperanto.fi* ◆ *www.facebook.com/Finnlando* ◆ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

# Homoj al homoj

En Eŭropo ne hantas fantomoj, sed vagas homoj. La plej grandaj homamasoj depost la kvardekaj jaroj postmilitaj serĉas novajn viveblecojn. Malsekureco, eĉ vivdanĝero, malriĉeco ĝis kompleta manko de vivrimedoj pelas homojn fuĝi el siaj hejmregionoj sude kaj oriente de Mediteraneo. Tiuj homoj fuĝas militojn – militojn civilajn, en kiuj alternativoj estas esti soldatigita en armeo buĉanta samlandanojn, esti mem buĉita aŭ riski forveturon por serĉi sekuran lokon; buĉi aŭ fuĝi, tio estas la kruela situacio de milionoj ĉirkaŭ Eŭropo.

Oni kutimas pensi pri Eŭropa Unio unuece. Ĝi tamen kun siaj 28 membro-ŝtatoj ne estas unueca. La areo de libera translima veturado, la Schengen-traktato, ampleksas 22 EU-landojn, dum kvar (Svisio, Norvegio, Islando kaj Liĥtenŝtejno) ekster EU aliĝis al la traktato. Kio gravas el la vidpunkto de rifuĝanta homo, estas la traktato de Dublin, kiu devigas tiun EU-landon, kien persono petanta azilon alvenas, pritrakti la peton. Sekve de tiu EU-leĝo, kelkaj landoj, pleje Italio kaj Grekio, devas porti la absolute plej pezan ŝarĝon de la eksplode kreskanta popolmigrado. Dum la pasinta somero kaj komencanta aŭtuno jam klare evidentiĝis, ke la postulo de la Dublin-traktato estas ne nur kontraŭhoma – ĉar ĝi kaŭzas enormajn suferojn al rifuĝantoj kaj senproporciajn ŝarĝojn al akceptantaj landoj – sed ankaŭ praktike neebla. La Eŭropuniaj ŝtatoj devas trovi interkonsenton kiel dividi la alvenantojn, el kiuj granda parto plej verŝajne restos kaj fariĝos Eŭropanoj. Iuj landoj, kiel Germanio, jam konsentis pri la neceso. Neceso, kiu ankaŭ estas ŝanco: la monda junularo ne naskiĝas en Eŭropo, kiu male bezonas novajn homojn pretajn refreŝigi, esti refortigo.

Ne nur inter, sed ankaŭ ene de unuopaj EU-ŝtatoj estas diversaj opinioj kiel rilati al la nova popolmigrado, eĉ ene de ties registaroj. Tiel ankaŭ en Finnlando, pri kies fine de majo fondita nova registaro mi skribis en la antaŭa numero de EL jene: *Pri Eŭropa Unio kaj eksterlandaj rilatoj estas konsento postuli striktan ekonomian kaj enmigradan politikon, ekzemple rifuzon de plia kvoto de rifuĝintoj. Subteno al evoluantaj landoj estas reduktata.* Pri la kvoto la registaro devis cedi. Malagordoj en la registaro pri la enmigrada politiko estas evidentaj, dum strikta ekonomio estas konsente akceptata. Aparte forte



**Membro de Eŭropa Parlamento Merja Kyllönen akceptas la finnlingvan biografion de Zamenhof de ties redaktinto Tuomo Grundström en Pori 17.2.2015. – El la 13 Finnlandaj MEP-oj almenaŭ du havas (kaj espereble almenaŭ foliumis) la verkon, krom Kyllönen, ankaŭ Sirpa Pietikäinen. Ni ne hezitu kapti okazojn serioze informi seriozulojn. Foto Kari Kuisti**

akceptadon de enmigrintoj kontraŭas en la registara koalicio partio aroganta sin eksterlande nomi ”La Finnoj”. La nombro de alvenantoj laŭ aktuala kalkulo atingos almenaŭ tridek mil ĉijare.

Eŭropo staras nun ĉe du vojoj. Unu estas akcepti mondan junularon, kiun elpelas el hejmlandoj krizoj, konfliktoj, civilaj militoj kaŭzitaj, almenaŭ parte, de imperiisma historio kaj politikaj eraroj de Eŭropo mem, kaj alia – konstrui fortikaĵon kontraŭ fluo, kiu povas nur ŝveli provate esti ŝtopita. Tia vojo kondukas al novaj katastrofoj.

Kiam Universala Kongreso de Esperanto lastfoje okazis en Finnlando, en Tampere 1995, okazadis en Eŭropo mem kruela civila milito en Balkano. Al Tampere sukcesis vivriskante veni unu esperantisto el la sieĝata Sarajevo. Antaŭan fojon estis UK 1969 en Helsinki, en jaro de refrostigita malvarma milito. En la jaro de la unua Finnlanda UK 1922 civila milito ankoraŭ daŭris en la najbara Ruslando.

EAF invitis UK 2018, konkurencas kun nia Lahti – Sarajevo. En 2018 pasos cent jaroj depost nia propra civilmilita mizero. Estiĝu, daŭru nova epoko al nia mondo.

*Tuomo Grundström*

# La jubilea 100-a Universala Kongreso

Jen la granda evento alvenis: la centa kongreso de UEA, la plej granda ĉiujara aranĝo en Esperantolando – en la nordfranca urbo Lille, proksime al la unua kongresurbo Bulonjo-ĉe-Maro.

Aliĝis 2 malpli ol 2700 kongresanoj (41 el Finnlando) el rekordaj 80 landoj, kvarono el la gastiganta lando Francio mem. Laŭkvante la dua plej granda UK de la nuna jarmilo, kaj la 14-a entute, ĝi prezentis indan jubileon kun entuziasma etoso – sen pluveto dum la unuaj tagoj estintus perfekte.

Duono de la finnaj partoprenintoj alvenis per buso sub gvido de *Tiina Oittinen* tra Svedio kaj Germanio.

La kongresejo konvenis taŭge inter la flandra kaj eŭropa stacidomoj, kaj proksime al la malnova urbo. Bedaŭrinde la Esperanto-flagoj antaŭ ĝi flirtis duonmaste, kio donis iom strangan impreson.

Interne la ejo havas iom nekutiman arkitekturon kun divido en triopajn etaĝojn kun kaŝitaj liftoj kaj brua akustiko, kiu ja ĝenis dum samtempa prezentado de muzikaĵoj, manĝado kaj renkonto en la ĉefa salono *Michaux*.



En la malnova urbo de Lillo (K)



Grupfoto de la karavanaj partoprenantoj (M)




Lille Grand Palais, la kongresejo (K)



Iomete videblas la komplika strukturo de la kongresejo (R)



Veturo tra kanaloj dum ekskurso al la belga Brugge (Bruĝo) (R)




Aliflanke en multaj lokoj de la urboj estis banderoloj kaj afiŝoj pri la kongreso kiel pruvo de komunikema LKK.

## Ekskursoj

Krom la kutimaj rigardoj de la urbo, vizito al artmuzeo, mara akvario kaj mineja muzeo okazis tuttagaj ekskursoj al la ĉefurbo Parizo, la belga urbo Bruĝo kaj *Boulogne-sur-Mer*, kie 1905 okazis la unua Universala Kongreso.

Por mi vizito de Bruĝo ja indas.

Antaŭ dek jaroj okazis renkontiĝo en Bulonjo-ĉe-Maro por memorigi la centjariĝon de Universalaj Kongresoj. Tiam stariĝis busto de L.L. Zamenhof ĉe stacidomo de la urbo. Nun instaliĝis aldona tabulo, kaj la urbo dediĉis ejon por iĝi Esperanto-centro.




Afiŝo por la UK (R)

Aldona tabulo al la busto de Zamenhof (K)

## Programo

Ŝatata programero sabate estas la Movada Foiro, kie je dekoj da tabloj prezentas sin landaj, fakaj kaj aliaj asocioj – kompreneble partoprenis ankaŭ EAF.

La kongreso havis iaspecan maskoton: Naturamiko, la ”afabla giganto”, kiu renkontis kongresanojn en la enirejo kaj gvidis ankaŭ tra la Nacia Vespero.

Dum la Malfermo salutis *Aini Vääräniemi* por Finnlando.


Alia kutima ero estas la prezentado de la Akademio de Esperanto, kie ĉifoje *Carlo Minnaja* resumis la historion de la instanco.

Kiel ekzemploj de la multaj kunsidoj (ateistoj, ĝemelaj urboj, …), prelegoj, prezentadoj eble servu mencio pri prozaj verkistoj. Ankaŭ *Jukka Pietiläinen* kaj *Zbigniew Galor* prezentis sian sociologian studon pri esperantistoj, krom aliaj aŭtoroj en la Libroservo – plia centra instanco de la kongresoj.

Krom la Internacia Vespero, teatraĵoj kaj koncertoj de ekzemple *Patrik*, *Pafklik*, *Gijom Armid'*, *Morice Benin* ankaŭ okazis eksteraj prezentadoj: procesio tra la urbo, kunkantado sur la ĉefplaco aŭ koncertvespero en la eksa stacidomo Sankta Savanto kun *JoMo* kaj *Martin Wiese*.



**Rigardo sur la Movadan Foiron en salono Michaux, ĉefa halo kun scenejo, kafejo kaj rendevua tabulo (M)**



**La Malfermo de la UK (K)**



**Saluto (K)**



Impona regea koncerto de Zhou Mack Mafuila (R)



Muzika procesio tra la urbo (K)




Reklamo por la venontjara piedpilka ĉampioneco (R)

Dum la Aŭkcio plej multe elspeziĝis por letero de Zamenhof (1100 €), dum la kongresnumero 1 estis havebla malmultekoste por nur dekono de ĝi.

Malagrablaĵo okazis dum piedpilka matĉo, kiam eksteruloj eniris la vestoŝanĝejon kaj priŝtelis ĉiujn ludantojn. Pro la polica esploro la ludo estis ĉesigita. Tamen spontanea kolekto de mono iom rekompencis la perdintojn. Ŝajne venontjare la eŭropa piedpilka ĉampioneco okazos ĝuste en Lille, al kiu mi deziras pli agrablajn spertojn.

Aliflanke dum la Fermo ni spertis grandan surprizon, kiam la prezidanto de la Loka Kongreskomitato por la 101-a UK en la slovaka urbo *Nitra*, *Peter Baláž*, publike svatis sian koramikinon *Dorota Rodzianko*.

La 101-a Universala Kongreso okazos de la 23-a ĝis 30-a de julio 2016 kaj akceptis la unuajn aliĝojn jam dum la 100-a UK en Lillo.

Informoj kaj ebleco aliĝi troviĝas ĉe *www.uea.org/kongresoj*.

*RB*

**Fotistoj por la bildoj estas Robert Bogenschneider (R), Katriina Muurainen-Särkkä (K) kaj Miamaria Saastamoinen (M)**

# La Aŭtunaj Tagoj de EAF en Lahti

Trideko da esperantistoj venis al Lahti por partopreni la Aŭtunajn Tagojn de Esperanto-Asocio de Finnlando, okazinta la 12-an – 13-an de septembro 2015, inter finnoj estis ankaŭ du eksterlandaj gastoj – el Latvio kaj Brazilo.

La vetero dum ambaŭ tagoj de la aranĝo estis suna kaj varma, kio permesis plene ĝui la promenadojn kaj ekskursojn.



En la UKK-arkivo, foto: RB

Sabate tuj post la Malfermo de la Tagoj en la hotelo *Kauppahotelli Grand* okazis komuna promenado preter la renovigita vendoplaco kaj laŭ *Vesijärvi* (Akvo-lago) al la haveno de Lahti. Ni povis de ekstere vidi la Sibeliusdomon (konstruita en 2000, 1250 sidlokoj) kaj viziti la centron de lignoproduktoj *Pro Puu* (galerion kaj vendejon), kiu situas en iama domo de alumetfabriko.

Dum lunĉo en la ŝipa restoracio *Kaunis Veera* (Bela Vera) nin atendis surprizo – renkontiĝi kun esperantistoj venis *Jan-Erik Andelin*, ĵurnalisto, redaktoro por ĉefartikoloj de la Helsinkia svedlingva ĵurnalo *Hufvudstadsbladet*. Li estas parenco de *Werner Anttila* (1869–1954), la aŭtoro de la esperanta-finna kaj finna-esperanta vortaro kaj esperanto-lernolibroj. Jan-Erik Andelin tre interese rakontis pri la historio de sia familio kaj la entreprenistaj fratoj Anttila.

Poste por dezirantoj estis ebleco viziti la Historian muzeon de Lahti.



Danko por Suunta, foto: Bruno Lehtinen

Sekva programero estis kortuŝa koncerto de la ensemblo *Suunta* (Direkto) kun *Timo Väänänen* (kantelo), *Kristiina Ilmonen* (blov- kaj perkutinstrumentoj) kaj *Anna-Kaisa Liedes* (kantado). La koncerto okazis en la *Kalevi Aho*-salono de la Muzikinstituto de Lahti, situanta apud la hotelo Kauppahotelli Grand. Estis surprizo por mi, ke la fama kaj internacie konata kantelisto Timo Väänänen estas esperantisto. Cetere li koncertis ankaŭ en Latvio kaj bone konas latvajn kantelistojn, eĉ lernis ĉe ili. Dum la koncerto Timo ne nur ludis, sed ankaŭ tre interese rakontis pri la muzikinstrumentoj ludataj de la ensemblo. Poste estis ebleco akiri

kompaktdiskojn de Timo Väänänen kaj multaj ĉi-eblecon ankaŭ utiligis. Timo kompilis ankaŭ libron pri latvaj, litovaj kaj estonaj kantelistoj – *Baltian kantelekansat*.

La lasta programero de la unua tago por la plejmulto estis komuma vespermanĝo en la hotela restoracio, tamen ne por la estraranoj de Esperanto-Asocio de Finnlando – ili ankoraŭ havis estrarkunsidon.

Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso, dum kiu estis ebleco viziti urbeton *Orimattila* kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. *Börje Eriksson* gvidis la ekskurson. Unue ni vizitis la arkivejon de eks-prezidento *Urho Kaleva Kekkonen* (1900–1986). La celo de la arkivo estas doni informojn pri la vivo kaj laboro de Urho Kekkonen kaj konservi liajn privatajn dokumentojn. La arkivon de dokumentoj de Kekkonen, ĉefe skribitaj en la finna, konsistigas 350 metroj da breta spaco. Ĝi estas la sola arkivo en Finnlando, kie esploristoj povas ankaŭ tranokti kaj do labori tiom longe, kiom ili volas. Ni aŭskultis rakonton pri la plej fama finna prezidento, vidis meblojn kaj objektojn apartenintaj al Urho Kekkonen.

La ekskurso pluiris al *Tapolan kyläyhteisö*, vilaĝeto por mense handikapitaj homoj. Tie kiel volontuloj laboras ankaŭ eksterlandanoj. Ni povis vidi la cirkonstancojn, en kiaj vivas la homoj kun specialaj bezonoj, eĉ privatajn ĉambrojn.

Poste ni vizitis la Artan muzeon de Orimattila, kiu estis la tria kaj fina celo de la ekskursa tago. Tie mi kun granda plezuro ĝuis pentraĵojn de tiaj konataj finnaj pentristoj kiel *Akseli Gallen-Kallela*, *Hugo Simberg*, *Albert Edelfelt*, *Helene Schjerfbeck* k.a.

La Aŭtunaj Tagoj estos reprezentataj en la finna gazetaro, ĉar la prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando estis longe intervjuata de ĵurnalistino el *Etelä-Suomen Sanomat*.

Post la ekskurso buso veturigis ĉiujn reen al Lahti kaj la Aŭtunaj Tagoj de 2015 estis fermitaj.

*Margarita Želve*
*Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio*

# Turku informas

Esperanto-societo en Turku havas renkontojn unu-du-foje semajne: ni revidas nin marde dum la kursoj de la *Civitana Instituto de Aurala* kaj merkrede inter 16.30–17.30 en la biblioteka kafejo *Sirius*. La kursotempoj estas de 15.30–17.00 (diskutgrupo) kaj 17.15–19.00 (elementanoj). Vi estas bonvena viziti, sed informiĝu ĉiam antaŭe ke ne okazis ŝanĝoj.

La etan **julfeston** ni havos ĉi-jare **merkrede la 16-a de decembro je 17.30** en la kutima kunvenejo NNKY en *Vähä-Hämeenkatu*. Anoncu vin, se vi deziras alveni, ĉar ni ja regalas kafon kontraŭ modesta prezo.

*Turun Esperanto-yhdistyksen jäsenet tapaavat viikoittain Auralan kansalaisopiston kursseilla tiistaisin ja kahvilatapaamisessa keskiviikkoisin kirjastossa. Kurssi alkaa klo 15.30 keskusteluryhmällä ja jatkuu klo 17.00 jälkeen alkeisryhmän kanssa. Keskiviikon tapaamisaika on klo 16.30–17.30 kahvila Siriuksessa. Tervetuloa mukaan, mutta varmista aina ettei ole tapahtunut muutoksia.*

*Yhdistyksen perinteiset* **pikkujoulut** *ovat* ***16.12. klo 17.30*** *alkaen tutussa NNKY-salissa Vähä-Hämeenkadulla. Tervetuloa myös sinne, ilmoittaudu etukäteen omakustanteisen kahvitarjoilun vuoksi.*

Kontaktuloj: *Tiina Oittinen*, tel. 050 549 4709 kaj *Leena Tiusanen*, tel. 050 575 7956.

# La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-52) invitas

**Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni la tradiciajn 52-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-52). La aranĝo okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).**

**Dato: La 2-an – 10-an de julio 2016**. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

**Loko**: BET–52 okazos en la urbo *Birštonas*, kiu situas 40 kilometrojn for de *Kaunas* kaj 90 kilometrojn for de de la ĉefurbo de Litovio *Vilnius*, apud la ĉefa rivero de Litovio *Nemunas*. Ĝi situas en la centro de la regiona nacia naturparko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. Birštonas estas antikva kaj fama balneologia kuracloko fondita en 1382. La urbo estas ideala loko por laboro kaj ripozo, ĝi estas facile atingebla buse kaj automobile. Eblos uzi multegajn (pli ol 50) diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn kaj servojn, naĝejon, saŭnon, sportan salonon k.a. BET52 havas subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo. La ĉefa lokalo de BET-52 estas la bonege ekipita sanatorio *Versmė*. En Birštonas jam okazis BET-40 en 2004.

**Partopreno**: ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. Antaŭ kaj post BET estas ebleco moderpreze ripozi, kuraci sin en unu el la tri tre altnivelaj kaj modernaj sanatorioj kaj kuracejoj *Versmė*, *Tulpės* kaj *Eglė* aŭ en urbaj hoteloj, gastejoj, turismejoj kaj ripozejoj.

**Aliĝo**: 55 €; infanoj, lernantoj kaj studentoj ne pagos aliĝkotizon. Eblas aliĝi rete ĉe *www.esperanto.lt/aligxilo_BET.html.* Pri aliaj aliĝeblecoj legu en la retejo de la aranĝo, same pri loĝado, manĝado, pageblecoj kaj aliaj financaj kaj ceteraj kondiĉoj. **Grave**: Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo por la loĝado (krom hoteloj) aŭ manĝado laŭelekte ne pagos.

**Programo**: tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri la situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en la naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

**Aliaj gravaĵoj**: Aktualajn kaj detalajn informojn pri BET-52 Vi povas trovi en la retejo *www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52*. Krome informoj pri BET aperas en la novaĵretejo *La Balta Ondo* (*www.sezonoj.ru*), la novaĵretejo *Barelo* (*www.barelo.blogspot.com*) kaj en la revuo *La Ondo de Esperanto*.

**Kontaktadreso**: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 ; +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadresoj de LEA estas: *litova.ea@mail.lt* ; *irenaa@takas.lt* ; *pjegorovas@takas.lt* . La retejo de BET–52 estas *www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52*

**Bonvenon al Litovio!**

# UEA premiis dek du elstarajn agantojn

En la Solena Fermo de la 100-a Universala Kongreso en Lillo estis anoncitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. Jen la ĉi-jaraj distingitoj:

### Diplomo pri Elstara Agado:

**Richard DELAMORE** (Aŭstralio) pro la realigo de la reta Esperanto-Televido;
**DOI Chieko** (Japanio) pro longtempa redaktado de "Esperanto en Azio";
**Ilona KOUTNY** (Pollando) pro la gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato A. Mickiewicz en Poznano;
**Birthe LAPENNA** (Danio) pro konservo de la materialoj pri la Montevidea rezolucio k.a. dokumentoj de Ivo Lapenna ĉe la Dana Ŝtata Arkivo;
**Ĵak LE PUIL** (Francio) pro la eldonado de la revuo "La KancerKliniko" ekde 1976;
**Ana MANERO** (Hispanio) pro la gvidado de la projekto Bitoteko de Hispana E-Federacio;
**Chuck SMITH** (Germanio) pro la realigo de la Esperanto-kurso en Duolingo;
**László SZILVÁSI** (Hungario) pro informa kaj ĵurnalisma Esperanto-agado;
**Francisco L. VEUTHEY** (Nederlando) pro la realigo de 75 filmoj por la Reta Kinejo de UEA;
**Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia** pro la organizado de Esperanta Filmfestivalo.

### Diplomo pri Elstara Arta Agado:

**Rogener PAVINSKI** (Brazilo) pro kontribuado al la muzika E-kulturo;
**WANG Chongfang** (Ĉinio) pro esperantigado de ĉina literaturo kaj pro vortara laboro

*laŭ GK 584*

# Du novaj Honoraj Membroj de UEA

UEA ricevis du novajn Honorajn Membrojn en Lillo. La Komitato de UEA povas distingi per tiu titolo esperantistojn, kiuj faris eksterordinarajn servojn al la tutmonda Esperanto-Movado. Ĉi-jare estis distingitaj la franca verkisto-eldonisto *André Cherpillod* kaj la germana historiisto kaj eksestrarano de UEA d-ro *Ulrich Lins*.

*laŭ GK 581*

# Mark Fettes venos al Finnlando por la festo de la Fondumo

Fondumo Esperanto festos sian 60-jariĝon en la tago de UN, sabaton la 24-an de oktobro je la 14-a horo, en la lekciejo 13 de la ĉefa konstruaĵo de la Universitato de Helsinko (Fabianinkatu 33).

Festparolos la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, profesoro *Mark Fettes*. Parolos ankaŭ la konataj esperantistoj *Anna Ritamäki-Sjöstrand* kaj *Tatu Lehtilä*.

Muzikan intervenon plenumos la kvarteto *Virta*: *Anna Grundström* (violonĉelo), *Pauliina Puukko* kaj *Saara Ertamo*, violono, kaj *Jenni Antikainen*, aldo.

### Bonvenon al la festo!

Pli da informoj riceveblas de *Jouko Lindstedt (jouko.lindstedt@professori.fi)*

La retpaĝo de la Fondumo: *www.helsinki.fi/~jslindst/fes.html*

# Baltiaj Esperanto-Tagoj en Talino, Estonio, 25.–28.6.2015



Folklora danco en la liberaera muzeo, fotis RB

BET okazas vice en Litovio, Latvio kaj Estonio, kaj nun estis la vico de Estonio, kie kunvenis 75 geesperantistoj el 9 landoj. Liston pri la landoj kaj homoj ni ne ricevis, sed kompreneble la plejparto de la partoprenantoj venis el baltaj landoj, ankaŭ el Pollando, Italio, Francio, Svedio kaj Finnlando venis kelkaj homoj. La programo konsistis ĉefe el prelegoj, sed ĉiun tagon finis ”Amuza vespero” inter la 19-a kaj 21-a horoj: dancado, muziko, interbabilado. La BET-ejo estis renovigita internulejo SISEKAITSEAKADEEMIA por fajrobrigadistoj, policistoj, limgardistoj kaj aliaj.

Karakterizas la BET-ojn, ke almenaŭ per unu florbukedo oni ornamas la podion, prelegejon/restoracion. En niaj nomŝildoj kaj antaŭ la pupitro de la prelegantoj vidiĝis ŝika nigra-blanka bildo pri mezepoka gardisto kiel metala ventomontrilo sur turo en Malnova Talino. Dum la prelegoj kaj fotaro-prezentadoj oni profitis de modernaj elektronikaĵoj. La manĝoj estis bongustaj kaj abundaj, bonaj ekzemploj de baltia kuirarto. La prezoj en la Libroservo kaj dum la tuta BET, kompare kun tiuj en Finnlando, estis favoraj, sed tamen oni scias, ke al baltoj kaj orient-eŭropanoj tio ne same aspektas. La etoso estis gaja kaj familieca, precipe en la fino.

La temo de BET-51 estis *Amikeco, toleremo, dialogo*. Dum la 4 kunventagoj oni ripete parolis pri kaj aludis al tiaj spiritaj temoj, pli malpli solene, aŭ praktike, eĉ amuze. Ni aŭdis ankaŭ pri la plej famaj geaŭtoroj de Latvio, *Rainis* kaj *Apazija*, pri la finna komponisto *Jean Sibelius* kaj lia muziko. Ni vidis lumbildojn pri Argentino kaj Bonaero, kaj pri la sezonoj en la ĉarma estona urbo *Haapsalu*. La ĉeestantoj ofte komentadis kaj demandadis pri la prezentataj aferoj. Ni ĝuis koncerton de *Georgo Handzlik*, duontagan aŭtobusan ekskurson en la urbocentro kaj alian ekskurson tuttagan iom ekster Talino. La laste menciitan eventon benis la suno per siaj varmaj radioj el blua ĉielo. Ni povis konatiĝi kun arkitekturo kaj vivo en la estona kamparo en la jarcentoj 1700–1900, kun popoldancoj kaj buntaj naciaj kostumoj de ensemblo *Leigarid*. Ni vidis la maron, belan riveron kun akvofaloj, parkojn, la palacon *Kadriorg*, ni aŭskultis muzikan benkon ĉe la fama estona kantejo. Jes, benkon, kiu ludis la plej furorajn kantojn de la estonaj kantofestoj.

Mi dormis en granda 7-lita dormoĉambro tute sola. Tial mi havis du duŝojn kaj du necesejojn je mia dispono. Estis komforte kaj kviete. Mi povintus uzi fridujon kaj akvoboligilon, sed mi ne bezonis pli da manĝoj ol la 2–3 ĉiutagajn bufedojn. La ”Adiaŭa balo” ĝojige surprizis nin

per bele metita bufedtablo kun multaj pladoj kaj pladetoj, kun Paradizo-floroj kaj ruĝaj kandeloj en arĝentkolora ingaro.

Jam pretas la Unua Bulteno de BET-52, kiu okazos en la urbo *Birŝtonas*, 90 km de Vilno. La informoj troveblas en la paĝoj de la Litova Esperanto-Asocio. BET-52 daŭros tutan semajnon, tie okazos ankaŭ diversnivelaj lingvokursoj, kiuj mankis en BET-51. Indas daŭrigi kaj partopreni tiel plaĉan tradicion.

*Saliko*

# Pola poetino Wislawa Szymborska

En la serio ”Oriento-okcidento” la 50-a volumo titoliĝas ”Mi inventas la mondon”. La verko enhavas selektitajn poemojn de *Wislawa Szymborska*, Nobel-premiito en 1996. Ŝi kreis entute 13 poemlibrojn kaj pli ol 350 poemojn inter la jaroj 1945–2012. Iu miris la malmultan nombron de poemoj. La poetino respondis: ”Mi havas hejme paperkorbon”.

Bjalistokanoj kaj krakovanoj efike kaj forte subtenis la eldonaĵon. Kiel ĉefaj motoroj en la agado laboris *Lidia Ligęza* kaj *Przemyslaw Wierzbowski*. Tiu ĉi tute freŝa verko enhavas 339 paĝojn. Samlandanino mia aĉetis ĝin por mi en la 100-a UK en Francio.

Avida legado komenciĝis tuj. ”Eta knabino detiras tablotukon” aparte haltigis min. Venis en mian memoron finna poemeto ”Kop, kop, kop” de *Matti Kuusi* (1914–1998), verkisto kaj popolpoezia sciencisto. En ambaŭ verkoj oni trafe kaptas la animstaton kaj pensmanieron de aventurema infaneto. *Wislawa Szymborska* konstatas koncerne la infanon: ”Ĉi tiu provo devas esti farita. Kaj estos.”

Estas malfacile klarigi, kial poemlibroj altiras min. Ĝenerale oni asertas, ke viroj evitas fabelan poezian mondon kaj preferas forkuri. Tamen oni povas substreki la signifon de polino kaj de finno *Eino Leino* kiel vojmontraj figuroj por poeziumada hobio. ”Mi inventas la mondon” estas ekzercetereno por kiu ajn. Varme mi rekomendas kuraĝan eniron sur la menciitan terenon.

Krome akcentindas trafa enkonduko de *Wojciech Ligęza* pri poemoj de Szymborska. Parolado ”La poeto kaj la mondo” ĉe la akcepto de la Nobel-premio pri literaturo, en Stokholmo la 7-an de decembro 1996 bele kompletigas la libron, kies kovrilan paĝon ornamas blanka kato en malplena ĉambro. Jen majstroverko por poeziumado de ordinara civitano. Ne neglektu tiun ĉi unikan eblecon.

*Jorma Ahomäki*

# Kursoj en la Esperantokastelo Greziljono

* 16a ĝis 20a de oktobro 2015: Korusa renkonto, retejo *www.gresillon.org/koruso*
* 24a de oktobro ĝis 1a de novembro 2015: kursaro AŬTUNE, retejo *www.gresillon.org/autune*
  - AMO-seminario ’Grimpi la monton granitan’ kun *Stefan MacGill*
  - lingva seminario kun *Christian Rivière*
  - rekta metodo kun *Zsófia Pataki*
  - speciala programo por infanoj, inkl. Halovena vespero
  - aliaj interesaj aktvaĵoj

MCE Grésillon, St. Martin d’Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, Francio,
+33 - 241 89 10 34, *kastelo@gresillon.org*

# Esperanton kesäkurssi Iisalmessa – Somera kurso en Iisalmi 14.–17.7.2016

## Esperantoa, luonnollisesti – Esperanto, nature

La Somera Esperantokurso de EAF en 2016 okazos en *Iisalmi* kunlabore kun la Esperantoklubo de Iisalmi kaj ELFI. La instruisto estos *Gražina Opulskienė*, kiun ni konas de la kurso en *Orivesi*. En la programo estos instruado 5–6 horojn tage kaj kiel kutime en ĉiuj niveloj de elementa ĝis progresiga. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la lingvon, eklernos la bazajn aferojn kun helpo de finnlingva gvidanto. Aliaj profundigos sian lingvoscion pere de la daŭriga kurso, kiam spertuloj povas helpi la novulojn. Dum la libertempo ni konatiĝos en la ĉirkaŭaĵo kun la lokaj esperantistoj, kiuj nature aldonos iom da frenezeco de la Savo-regiono al nia somera vizito.

Nia ĉefinstruistino, Gražina Opulskienė el Litovio, jam dum multaj jaroj instruis Esperanton en sia hejmregiono kaj en la tuta mondo. Ŝi uzas la rektan metodon en la instruado kaj elektos al ni taŭgajn ekzerzojn kaj antaŭ ĉio diskutigos nin. En la kursoprogramo estos ankaŭ ŝia prelegeto pri interesa temo. Kiel kursorespondeculo kaj helpinstruisto agos *Tiina Oittinen* el Turku.

La kursejo situas en la kamparo proksime de la bieno de *Onni Kauppinen*. La kursokotizo inkluzivos instruadon, manĝaĵojn kaj ekskursojn. Tranoktejoj estos aŭ en hotelo en Iisalmi aŭ en amasloĝejo (parte tendaro) ĉe Onni. Transportoj aranĝiĝos el Iisalmi.

Pliaj informoj en la venontaj gazetnumeroj kaj en niaj retpaĝoj, sed rezervu jam nun la tempon!

*Bonvenon al Iisalmi!*
*Onni, Gražina kaj Tiina*

*Suomen Esperantoliiton kesäkurssi pidetään ensi kesänä Iisalmen maisemissa yhteistyössä Iisalmen Esperantoklubin ja Suomen opettajien esperantoyhdistyksen kanssa. Opettajaksi tulee Oriveden kurssilta tuttu Gražina Opulskienė. Ohjelmassa on opetusta päivittäin 5–6 tuntia ja opiskelijat jakautuvat ryhmiin taitojensa mukaan. Kieleen vasta tutustuvat aloittavat alkeista ja jatkoryhmä syventää kielitaitoaan. Vapaa-aikana tutustumme ihanaan savolaiseen luontoon ja paikalliseen luovaan hulluuteen.*


Gražina Opulskienė

*Pääopettaja Gražina Opulskienė on opettanut esperantoa jo usean vuoden ajan sekä kotiseudullaan Liettuassa että kaikkialla maailmassa. Hän käyttää opetuksessaan ainoastaan esperantoa. Gražinan opetuksesta saavat nauttia sekä alkeis- että jatkoryhmäläiset, tarvittaessa kurssivastava Tiina Oittinen Turusta toimii apuopettajana. Gražina myös luennoi kurssilaisille sopivasta ja kiinnostavasta aiheesta, luento tulkitaan tarpeen mukaan suomeksi.*

*Kurssipaikka Nerkonniemen kyläntalo sijaitsee lähellä Iisalmen Esperantokerhon puheenjohtajan Onni Kauppisen maatilaa. Kurssimaksuun kuuluu opetus, ruokailut ja retket. Yöpymismahdollisuus on valinnan mukaan joko hotellissa Iisalmessa tai Onnin maatilalla yhteismajoituksessa (osin teltassa). Kuljetukset Iisalmesta kurssipaikalle järjestetään tarpeen mukaan.*

*Merkitse kurssiaika heti kalenteriisi! Lisätietoja saat lehden seuraavissa numeroissa. Seuraa myös liiton nettisivuja.*

*Tervetuloa Iisalmeen!*
*Onni, Gražina ja Tiina*

# Veronika Poór nova Ĝenerala Direktoro de UEA



En la komitata kunsido en la 100-a UK, sabate, la 31-an de julio, estis publikigita la decido de la Estraro de UEA elekti d-inon *Veronika Poór* el Hungario kiel la novan Ĝeneralan Direktoron de la Asocio. Fari tiun decidon postulis kelkajn tagojn post la intervjuoj kun tri kandidatoj, pro la alta kvalito de ĉiuj prezentaĵoj.

Veronika Poór eklaboros en la Centra Oficejo komence de januaro 2016. Dum dumonata transira fazo la nuna kaj estonta direktoroj kunlaboros pri la transdono de taskoj. Poór formale transprenos la oficon komence de marto.

Veronika Poór naskiĝis en 1983. Ŝi doktoriĝis pri fiziko en la kampo de nanoteknologio. Ŝi kunfondis la retradio-kanalon *Muzaiko* kaj ŝi estas estrarano de TEJO pri Aktivula Trejnado, Eksteraj Rilatoj, Homaj Rimedoj kaj Scienca kaj Faka Agado. En tiu rolo ŝi verkis aŭ kunverkis kvin retajn trejnadojn de TEJO, estis elektita al la Konsila Konsilio pri Junularo de la Konsilio de Eŭropo, superrigardis la kreadon de nova enkonduko por novaj membroj kaj ekorganizis Sciencajn Prelegsesiojn. Aldone ŝi grave kontribuis al la verkado de sukcesaj subvencipetoj de TEJO.

Prezentante la decidon, prezidanto Mark Fettes dankis la aliajn kandidatojn pro ilia preteco por la tasko. Li ankaŭ esprimis dankon al *Osmo Buller* pro lia multjara sindediĉo kiel la Ĝenerala Direktoro.

*laŭ GK 583*

# Premio Deguĉi 2015 al Éva Farkas-Tatár



La *Premio Onisaburo Deguĉi*, ”la esperantista pacpremio”, estis starigita per donaco de *Oomoto* en 1987 kaj estas aljuĝata ĉiujare. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

Laŭ sia regularo la premio estas aljuĝata ”pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de d-ro Zamenhof kaj al instruoj de Onisaburo Deguĉi, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj”.

La Estraro de UEA aljuĝis la Premion Deguĉi de la jaro 2015 al s-ino *Éva Farkas-Tatár* el Hungario.

Éva Farkas-Tatár lernis Esperanton 37-jara en 1961. En la sekva jaro ŝi partoprenis la Universalan Kongreson en Kopenhago, kiu tiom ravis ŝin, ke ŝi decidis plene dediĉi sin al la instruado de Esperanto. Por perfektiĝi pri tiu arto ŝi iris al la UK en Hago en 1964 por sekvi lecionojn de *Andreo Cseh*. Tiel komenciĝis 50-jara instrua agado per la Cseh-metodo en multaj landoj kaj ĉe multaj UK-oj kaj plej diversaj aliaj renkontiĝoj.

*laŭ GK 585*

# La 48-a konferenco de ILEI

La konferenco okazis julie 2015 en la marborda urbo *Oostende* en Belgio. Inter la 138 partoprenantoj el 30 landoj estis tri finnoj: *Synnöve Mynttinen* kaj mi kiel komitatanoj kaj *Kari Pyykkö* el *Rusko*. Komitatanoj estas reprezentantoj de la loka sekcio, t.e. ELFI. La konferenco okazis en la junulargastejo *De Ploate*, kiu ŝajnis esti nur en nia uzo. La domo aĝas nur du jarojn, do ĝi estas moderna kvaretaĝa konstruaĵo en la centro de la urbo – kun lifto kaj propra manĝejo. Mi mencias kelkajn forajn landojn de kie ni havis konferencanojn: Kubo, Usono, Armenio, Benino, Indonezio, Madagaskaro, Nepalo, Orienta Timoro kaj Aŭstralio.



Malfermo ĉe la urbodomo.

La komitataj kunsidoj (jarkunsido) estis la plej grava programero por ILEI, la aliaj por la konferencanoj. Pri la elekto de la estraro mi menciu, ke kiel prezidanto de ILEI daŭrigas *Mireille Grosjean*, la nova sekretario estas *Emile Malanda Nianga* el Sud-Afriko kaj kasisto, kiel pli frue, *Wilĉjo Harris*. Synnöve Mynttinen daŭrigas kiel membro de la elekta komisiono.

Samtempe okazis pluraj programeroj kaj tial ne eblis aŭskulti ĉion interesan. Paralele funkciis instruista trejnseminario, al kies programeroj mi ĉijare ne partoprenis, kvankam multaj unuopaj prezentadoj estintus gravaj. Kaj dum la lastaj du tagoj oni povis sekvi la prelegojn de la Simpozio, kies temo estis Lingva justeco kaj paco – Kiuj defioj por la nuna mondo. En la lingva festivalo estis prezentitaj 35 lingvoj.

La ĉefan simpozian prelegon faris la belga kirurgo d-ro *Réginald Moreels*. Li iam estis ministro, iam senatano en Belgio, kaj aktivis en la internacia, neŭtrala medicina helporgano Kuracistoj sen limo. Tiu organizo aktivas en 88 landoj kaj helpas dum militaj konfliktoj kaj post naturkatastrofoj. Li havis kiel la temon de la prelego Ĉu milito povas esti justa? Mi komprenis, ke li diris ne, sed iam jes kaj ĉiukaze la problemo estas la homo, kiu ekde sia ekzisto sur la mondo kverelis kaj ”militis”. Lia persona konkludo estis: ”Por malarmigi la mondon ni bezonos novan homspecon.” Li estis la sola, kiu en la konferenco parolis en por mi nekomprenebla lingvo, la franca. Ne estis interpretado sed la publiko ricevis resumon papere kaj la preleganto montris bildojn sur la ekrano, do la enhavon oni komprenis. Tiam mi sentis kiel neebla estas la situacio kiam oni tute ne komprenas la parolatan lingvon. Mi pensis pri la rifuĝintoj, kiuj ĝuste ĉi tiun someron amase migras en Eŭropon kaj ekz. en Finnlandon sciante eĉ ne la anglan lingvon.

Mi partoprenis en du ekskursoj. Unu el la tuttagaj ekskursoj direktiĝis al Bruselo. Por la 15 vojaĝantoj estis rezervita unu tuta trajnvagono! Por renkonti nin kvar bruselaj esperantistoj krom la loka gvidanto sekvis parton de la ekskurso tie. La vizito en Parlamentarium, la inform- kaj vizitcentro de la Eŭropa Parlamento, estis interesega kaj ĝi postulas plurajn vizitojn, se tio nur eblus. La vizittempo estis limigita je unu kaj duona horo. La duan ekskurson mi faris sola al la eta urbo *Brygge* por viziti la Puntcentron (Pitsikeskus).

Laŭ mi la tuta enhavo de la konferenco estis pli varia kaj interesa ol en la antaŭaj kvin konferencoj, kiujn mi ĉeestis.

*Sylvia Hämäläinen*

# TEJO kun nova prezidanto

La Komitato de TEJO, kiu kunsidis en la 71-a Internacia Junulara Kongreso, elektis la Estraron por la oficperiodo 2015–2017. La nova prezidanto estas la antaŭa vicprezidanto *Michael Boris Mandirola* el Italio. Li gvidos 5-personan teamon, en kiu ĉiuj krom li estas en la Estraro por la unua fojo.

Mandirola kandidatiĝis por la posteno surloke kaj ricevis pli da voĉoj (14) ol la ĝisnuna prezidanto *Łukasz Żebrowski* (8). Por tio necesis tamen du sekretaj voĉdonoj, ĉar en la unua neniu el la kandidatoj ricevis pli ol 50% de la voĉoj (Mandirola: 9, Żebrowski: 10). La Komitato signife malgrandigis la estraron: el la 7-kapa organo ĝi iĝis 5-persona, malgraŭ la rekomendo de la Elekta Komisiono elekti 8 estraranojn.

La novaj estraranoj kaj ilia taskodivido estas:

– prezidanto *Michael Boris Mandirola* (Italio): kunordigo, eksteraj rilatoj, aktivula trejnado, rilatoj kun UEA;
– vicprezidanto *Juliana Evandro* (Brazilo; 16 voĉoj): informado, kulturo, homaj rimedoj, adoleska agado, Pasporta Servo;
– ĝenerala sekretario *Arina Osipova* (Rusio; 21 voĉoj): edukado, rilatoj kun ILEI kaj Fondumo Zamenhof;
– kasisto *Cédric Marchal* (Belgio; 23 voĉoj): subvencipetado, rilatoj kun UEA;
– *Ariadna García Gutiérrez* (Kubo; 23 voĉoj): landa agado, scienca kaj faka agado.

La Komitato elektis ankaŭ novan Elektan Komisionon, kiu konsistas el *Rogier Huurman* (19 voĉoj), *Paweł Fischer-Kotowski* (18) kaj *Alexandre Raymond* (13).

En la tagordo de la Komitato troviĝis la demando pri la jura sendependiĝo, por kiu TEJO ricevis en la antaŭa semajno aprobon de la Komitato de UEA. Tamen, la supera organo de la junulara sekcio de UEA ne pretis alpreni decidon jam nun, sed taskis al la Estraro finpretigon de la kontrakto inter UEA kaj TEJO. Nur tiam ĝi konsideros ĉiujn dokumentojn – la statuton kaj la kontrakton – kaj decidos pri ili en reta voĉdono. Tiun solvon subtenis 14 komitatanoj, dum 6 preferis tujan aprobon de la statuto.

En la kongreso estis akceptita la aliĝpeto de Benina Organizo de Junaj Esperantistoj (BOJE) kiel nova landa sekcio.

La 71-a IJK en la germana urbo *Wiesbaden* komenciĝis la 2-an kaj daŭris ĝis la 9-a de aŭgusto. Partoprenis ĉ. 300 esperantistoj el pli ol 50 landoj, plejparte sub 30 jaroj. En 2016 la kongreso okazos en Vroclavo, Pollando.

*laŭ GK 585*

## Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

**24.10.** 60-jariĝfesto de Fondumo Esperanto en Helsinki
**14.12.** Zamenhof-tago en Tampere
**15.12.** Zamenhof-tago en la oficejo en Helsinki
**16.12.** Zamenhof-tago kaj jula festeto de EST en Turku

## Esperanto-societo Antaŭen informas

- 05.10. je la 17.00 Oktobra vespero
- 09.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 23.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 14.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Iun estraranon vi renkontas en *Nesto*, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17. Bv. vidi pliajn informojn ĉe la retejo *www.esperanto.fi/tampere*

*Estraro*

# ”Helil kyläs” televisiosarja

Kymmenosainen Heli Laaksosen juontama keskusteluohjelma sai monet katsojat innostumaan. Minäkin katselin kaikki jaksot. Osan kahteen kertaan. Luonnikkaasti Heli johdatteli dialogia kotonaan. Aiheita raapaistiin pintaa syvemmältä. Tunnetut julkisuuden hahmot eivät häkellyttäneet ohjelman vetäjää. Huumoriakin viljeltiin. Tähtitieteen professori Esko Valtaoja pyyhki patalapulla pölyjä kotikirjaston teoksista.

Jälkeen ei jäänyt emeritus valtiosihteeri Raimo Sailaskaan. Hän sai leikata vehnäpitkosta miehiseen makuun sopivia paksuja siivuja. Keskustelujen aiheet vangitsivat katsojan kuvaruudun ääreen. Maalaismaisemaan liittyvät kuvakulmat olivat silmää hiveleviä.

Viimeisessä jaksossa kahden taitavan kynänkäyttäjän mielipiteiden vaihto oli nautinnollista seurattavaa. Eräs Tuula-Liina Variksen ajatus ei kuitenkaan oikein avautunut minulle. Hän sanoi: ”Mielestäni ei ole mahdollista tehdä keinokieltä, et voi ilmaista sillä itseäsi.”

Luen parhaillaan New Yorkissa toimivan Mondial-kustantamon 2008 julkaisemaa 700-sivuista teosta ”The Original Literature of Esperanto”, jonka tekijä on englantilainen Geoffrey Sutton. Tämä kirjallisuuden historia kattaa vuodet 1887–2007. Yhtä kiinnostavaa on tutkia italialaisen professori Carlo Minnajan Sveitsissä tänä vuonna 2015 julkaisemaa kirjaa ”Historio de la Esperanta Literaturo”. Se on myös 748-sivuinen tiiliskivi.

Mikäli lukee pohdiskellen näitä edellämainittuja teoksia, ei liene ihmeteltävää, miksi pysähdyin miettimään suuresti arvostamani kirjailijan Tuula-Liina Variksen esittämää mielipidettä. Ehkä jotain tietä saan valaistusta ihmettelyyni. Mainittakoon vielä, että sveitsiläinen Edmond Privat on julkaissut teoksen ”Tunteiden ilmaiseminen esperantoksi”.

*Jorma Ahomäki*

# Rezulto de enketo pri Esperanto-produktoj

Kiuj interesiĝas pri analizoj kaj nombraj datumoj de Esperantujo, verŝajne kun ĝojo renkontis la rezultopanelon de la enketado pri Esperantaj amasmediaj produktoj (muzikoj, filmoj, libroj, ktp).

La enketilon de *Jonas Marx*, germana juna esperantisto (kantisto) plenigis 142 homoj interrete, la enketa rezulto montras iliajn respondojn. Ĉe la analizado oni devas konsideri ke la nombroj montras ne la ĝeneralan sekcon de la Esperanta komunumo, sed de la plej aktiva, interretuma tavolo.

La enketila rezulto montras respondojn al 21 demandoj, kaj ĝi videblas en la retejo de J. Marx ĉe: *jonny-m.org/enketo/rezulto.php* .

*Ret-Info, LS*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti *eafgazeto@esperanto.fi*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *www.esperanto.fi/helsinki* *jukka.pietilainen@he*lsinki.fi(Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 *onni.kauppinen@pp.inet.fi*
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 💻 *kimmo.hannula@creavit.fi*, *www.esperanto.fi/jyvaskyla*
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala 💻 *www.esperanto.fi/oulu* *aini.esp@hotmail.com*
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Carola Antskog) Hedbergsvägen 3 B, 25700 Kimito 💻 *cantskog@kolumbus.fi*
- Esperantoseura Antaŭen r.y. / Esperanto-societo Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere 💻 *ww.esperanto.fi/tampere (*Markus Sunela*: markus.sunela@iki.fi* ☎ 040 7685 165)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 *tiina.oittinen@pp.inet.fi* ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. 💻 *sylvia.h@kolumbus.fi* ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 🖷 (09) 660 651 💻 *steleto@pp.inet.fi*
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *fejo@esperanto.fi*. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). 💻 *esperarto@phnet.fi*.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna**
**aperas dum la jaro** **2015**

| Nro | Limdato | Aperas |
|---|---|---|
| 5/2015 | 15.11. | en decembro |

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 EUR | 1/1 sivu/paĝo 50 EUR |
| 1/2 sivua/paĝo 60 EUR | 1/2 sivua/paĝo 30 EUR |
| 1/4 sivua/paĝo 40 EUR | 1/4 sivua/paĝo 20 EUR |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: *eafgazeto@esperanto.fi* aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

BA2
Itella Posti Oy

Itella Green

# Esperanto bonvena sur la insulo Saaremaa

La plej granda insulo de Estonio *Saaremaa* estas unu el la interesaj kaj valoraj vidindaĵoj, ĉar ĝi estas ne nur alloga, kun belega naturo, sed ankaŭ havas gravan originalan specifon – ĉi tie ĝis hodiaŭ konserviĝis tipe estona loka loĝantaro, naciaj tradicioj kaj popola vivstilo. Oni diras, same kiel sen Napolo aŭ Sicilio ne estas eble viziti Italion, kaj ke tiu, kiu ne vidis la insulon Saaremaa – ne vidis Estonion. Ĉiujare pli ol sep mil turistoj vizitas la insulon, inter ili ofte troviĝas esperantistoj.

Sur Saaremaa la Esperanto-movado havas longan tradicion. Eĉ la apuda insuleto *Vilsandi* (8,8 km²) antaŭ 1940 havis pli ol 200 loĝantojn, propran bazan lernejon kaj sendadis lernantojn por fini mezlernejon al la najbara urbeto *Kihelkonna*. En Vilsandi dudek lernantoj studis Esperanton kaj en 1934 du personoj el Vilsandi partoprenis la UK de Esperanto en Stokholmo/Svedio. Nun sur la insuleto loĝas somere ĉ. tridek personoj.

Ĉi-jare en *Kuressaare/Arensburgo*, ĉefurbo de Saaremaa, estas kelkaj personoj, kiuj studas Esperanton aŭtodidakte, pere de interreto aŭ konsultado kun instruistoj – doc. *Vjaceslav Hromov* kaj *Virve Ernits*, ambaŭ loĝantoj en Kuressaare, kies hejma lingvo estas Esperanto.

La ĉefa loka gazeto ”Meie Maa” (Nia lando) kaj Saare-Centra Biblioteko subtenas Esperanton kiel tradician hobion en la spektro de diversflanka riĉa kultura vivo en Kuressaare.

Nia Esperanto-kontaktadreso estas:
*whromow@gmail.com*

*Vjaceslav Hromov, Virve Ernits,*
*Meida Kesküla*

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 15.11.2015 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2015 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <*eafgazeto@esperanto.fi*>.

Kopio Niini, Tampere 2015